

Heinrich Heine,  
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt  
Liebliches Geläute  
Klinge, kleines Frühlingslied,  
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,  
Wo die Blumen sprießen,  
Wenn du eine Rose schaust,  
Sag, ich laß sie grüßen.

...

Heinrich Heine,  
Softe vibras tra l'anim'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'  
melodi' tenera,  
flugu al la malproksim',  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz', en mia nom'  
ŝin salutun varme.

...

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor',  
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz' –  
ĝin de mi salutun.

...

Heinrich Heine,  
Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet'  
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz', ke mi  
Saluteton sendas.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto “Gutenberg.Spiegel” sub [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x\\_d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x_d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found).*

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)*

*El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”.*

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [[lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier). Li verkis interalie la kant-libreton “Esperantista Kantaro”, kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.*